Año X (N.° 108)

# Boletín

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

Núm. 2

MARZO ABRIL 1958

PELAYO, 7 VALENCIA (ESPAÑA)

## ◆ ◆ UN SABIO AUTÉNTICO ◆ ◆

**Entre la numerosa cohorte de investigadores actuales, que merecen el agradecimiento de la humanidad, destaca la figura simpática, sencilla, pero científicamente acusada, del Doctor Pierre Bovet, último premio Nobel de Medicina.**

**Desde sus años mozos, el Doctor Bovet se distinguió por su afán de investigación; los laboratorios de media Europa conocen de sus inquietudes científicas y humanas. Ese universalismo de la Medicina, que no conoce fronteras ni convencionalismos, ha tallado en la personalidad de Bovet tantas facetas, que su contorno no presenta aristas ni planos de exclusivismo. Todo en ella es suave, amable y generalizador: su origen, su educación y su formación científica. Nacido y educado en Suiza —país esencialmente polifacético—, su desarrollo y pujanza intelectual no conoce predominio... Como consecuencia lógica de esa ubicuidad física y mental, el Doctor Bovet es un políglota absoluto, en el sentido de su faceta de predominio idiomático: el francés, alemán, inglés e italiano son manejados por él con igual maestría, tanto en la conversación normal como en notables conferencias o en múltiples trabajos científicos. Pero no habríamos comentado este aspecto idiomático de la personalidad del Doctor Pierre Bovet si no fuese porque, siendo como es un aprovechado usuario de tantos idiomas para sus actividades, libre del gran inconveniente de no poder conversar y estudiar por falta de recursos lingüísticos, el sabio y políglota es, además, un esperantista convencido.**

**Su padre, el Profesor Bovet, ya fué un gran propugnador del Esperanto, siendo como era tan acabado políglota como el hijo, que heredó la capacidad y las aficiones paternas. El hecho del esperantismo de Bovet nos sugiere algunas sustanciosas consideraciones: La primera que Bovet, luminaria del saber, se pone en la misma fila que otros sabios, como Richet, Torres Quevedo, La Cierva, etc., que, conociendo muchos idiomas, no desdeñaron conocer y practicar el internacional.**

**La segunda: que aun conociendo bien cinco idiomas, quedan muchos huecos por llenar, y que aun tratándose de personalidades intelectuales, son legión aquellos que solo conocen su propio idioma y consideran los ajenos como cosa apenas abordable.**

---

**Oni estas invitata al Printempa Esperantista Restado en Perlora (Asturio)**

Sole nur por 525 pesetoj po persono, oni povos pasigi agrablajn feriojn de la 1.ª ĝis la 14.ª de Junio en alloga trankvila loko, ĉe marbordo, en la nordo de Hispanio. Oni donos informojn kaj akceptos aliĝojn, antaŭ la 1.ª de Majo, en Esperantista Klubo «Nordo» de «Educación y Descanso», Calle de San Juan, núm. 10, Oviedo (Hispanio)

---

**Y la última, la de orden psicológico: la ciencia es cada vez más universal, y cada vez menos encerrada en compartimentos; la Medicina, la Ingeniería y la Psicología no tienen límites nacionales, ni aun continentales. Pero aún quedan ingénuos que estiman que el Esperanto puede ser, a lo sumo, un medio de relación de utilidad limitada para los que se consideren incapaces de aprender idiomas nacionales; esto es, para gentes de cultura elemental. Ignoran los que tal creen, que la capacidad idiomática es una característica mental, independiente del grado de cultura, ya que mientras hay médicos o ingenieros destacados que confiesan su inutilidad para el estudio de idiomas, hay gente de escasa cultura que los asimila rápidamente.**

**Y esta verdad confirma la necesidad de la implantación, en todo el mundo, de un idioma neutral para todo y para todos. Lo mismo para la poesía que para la astronáutica; lo mismo para un viajante que para un premio Nobel de Medicina.**

# FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

## TESORERIA

## BALANCE EN 31 DE DICIEMBRE DE 1957

### ENTRADAS

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Cuotas atrasadas | | 62'50 | | |
| Cuotas del año 1957. | | 30.703'50 | | |
| Donativos durante el año | | 5.000'— | 35.766'— | |
| Congreso de Barcelona: su entrega. | | 2.000'— | | |
| Matrículas y diplomas: «Stelo de Paco». | | 300'— | | |
| » » Madrid | | 125'— | 2.425'— | 38.191'— |

### SALIDAS

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Cuota U. E. A. año 1957 | | | 984'— | |
| Material y gastos Secretaría | | 1.401'15 | | |
| Gastos de Tesorería | 944'95 | | | |
| Reintegros por reembolsos | 416'— | 528'95 | | |
| Correos y otros varios | | 1.072'80 | 3.002'90 | |
| Edición del Boletín | | 29.411'30 | | |
| Sobres y gastos envío | | 3.731'70 | 33.143'— | |
| Edición carteles | | 2.600'— | | |
| Por venta tarjetas | 198'— | | | |
| Por venta Boletines | 1.953'— | 2.151'— | 449'— | |
| Edición «Adresaro» y envío | | 3.982'60 | | |
| Por anuncios «Adresaro». | | 175'— | 3.807'60 | |
| Gastos y material difusión | | 113'20 | | |
| Gastos por Servicios Federación | | 244'20 | 357'40 | 42.743'90 |

| | |
|---|---|
| Déficit en el año 1957 | 3.552'90 |
| Saldo en 31 de Diciembre de 1956 | 4.129'85 |
| Saldo en 31 de Diciembre de 1957 | 576'95 |

Valencia, a 31 de Diciembre de 1957

El Tesorero, *Ernesto Guillem*

---

La sabaton, 18an de Januaro, en la salono de «Montepío de la Dependencia Mercantil», kun ĉeesto de la Valencia samideanaro, okazis intima festeto por distribui la monon, tiucele malavare sendita de la esperantistaro, inter la amikoj suferintaj damaĝojn dum la inundo. Kvankam la materia kvanto estis atentinda, plej valoris ĝia morala signifo.

---

## CURSOS DE ESPERANTO EN LA CASA SINDICAL DE MADRID

**En la Delegación Nacional de Sindicatos se han iniciado las clases de un curso piloto de idiomas para funcionarios de la Organización Sindical, organizado por la Agrupación de Profesores de Idiomas, dependiente del Sindicato de Actividades Diversas. Los idiomas elegidos fueron el francés, el inglés, el alemán, el italiano, el ruso y Esperanto, dándose la circunstancia de no haberse registrado inscripción alguna para el italiano y el ruso, por lo que solo han sido mencionados, en la propaganda aparecida en la Prensa y Radio, el francés, inglés, alemán y Esperanto. Al acto inaugurál asistieron el Agregado Cultural de la Embajada de Francia, el Agregado Cultural de la Embajada de Alemania y, en representación de los esperantistas, don Angel Figuerola, pronunciando los tres delegados breves discursos, que fueron muy aplaudidos. Concurrieron al acto unas 800 personas, que ocuparon totalmente el Salón de Actos de la Casa Sindical. Este acto tuvo lugar el día 20 del pasado Enero.**

**Este curso tendrá una duración de un mes, iniciándose a su terminación otro de mayor amplitud para quienes, habiendo asistido al presente, tengan interés en continuar sus estudios.**

*Vere sinceraj opinioj estas nur tiuj, kiujn oni diras antaŭ tre reduktita nombro da personoj.*

RAMÓN Y CAJAL

# SFINKSA ANGULETO

## STRANGA ŜTUPARO

En proksima tramhaltejo, edzino kelkfoje resendas sian edzon al la loĝejo por alporti ion, kion ŝi forgesis. Tamen, ankoraŭ unu fojon ŝi petas lin alporti plian objekton. Sed nun la pacienco de ŝia edzo finiĝis: *«Mi iris jam kvar fojojn la ŝtuparon supren kaj tri fojojn malsupren; nun iru vi mem!»*

**Kiel estas eble, ke li jam iris kvar fojojn supren kaj tri fojojn malsupren?**

Ĝusta solvo gajnos unu poenton ĝis 20. Aprilo.

## SOLVO PRI LA UNUA LITERO EN LA PASINTA NUMERO

PUBO

TUBO - BUBO - DUBO - RUBO - NUBO - KUBO

## Sprito estas homa supera kvalito...

En ekspozicio, oni demandas al amiko:

—Kion signifas tiu pentraĵo: tagiĝon aŭ vesperiĝon?

—Vesperiĝon; tute certe!

—Kial vi asertas tion tiel aplombe?

—Ĉar la aŭtoron mi konas tre bone. Neniam li ellitiĝas antaŭ ol plena tagmezo.

—

Sinjoro proksimiĝas al izolita fiŝkaptanto, kaj demandas tre afable:

—Ĉu bona sukceso?

—Ho, jes! Hieraŭ mi fiŝkaptis ĉi tie mem pli ol kvardek trutojn.

—Nu, ĉi tie estas malpermesate fiŝkapti, kaj mi estas la inspektoro, kiu zorgas pri tio.

—Ne grave, ĉar mi estas la unua plej fama mensogulo en la tuta urbo...

—

Riĉa maljuna fraŭlo mortis. Kiel heredaĵon, li donis sian tutan kapitalon al tri virinoj, kiuj en diversaj okazoj rifuzis liajn proponojn pri edziĝo.

»Mi postlasas al ili mian havaĵon --li diris en la testamento-- ĉar dank' al ili mi povis ĝui pacon kaj feliĉon en la mondo».

*Ĉiu malvenko havas signifon kaj malkovras kulpon!*

STEFAN SWEIG

## PLUVOMBRELO EN VINTRO

Ekzistas io, kio protektas la amon pli dolĉe ol la blua ĉielo de Majo: la pluvombrelo! ĉar taŭga rimedo ĝi estas por ŝirmi la amatinon, kiam falas la vintraj pluvoj. Vere, ĝi havas iom da hejmo, iom da alkovo... Ĝia kupolo kaj la fadenoj el likva kristalo, pendantaj de la vergetoj, formas idealan dometon, en kies interno oni povas iri, kvazaŭ izolitaj, tra la homamaso. Ĝi ankaŭ efektivigas iom modeste tiun revon je nevidebleco, tiel kara por la geamantoj kaj... por la rabistoj, sekve do, por la tuta homaro...

En stratoj ne multe trairataj, oni povas facile malaperi de la rigardoj de preterpaŝantoj, nur per eta klino de la ombrelo. Tiam estas permesate kisi ruĝajn lipojn kaj rozajn vangojn.

Sed pasos la tempo, kaj en tago de Aŭgusto, oni flustros al la sama amatino:

—Ĉu vi memoras? Estis ĉi tie...

Ŝi rigardos; kaj ŝi vidos straton plenan de lumo, invaditan de homoj: buboj en la pavimo, klaĉemaj virinoj ope sidantaj sur maldelikataj seĝoj, kaj certe ŝi ne povos kompreni, kiel povis ĉi tie okazi la romantika epizodo...

Anonima skribaĵo, kíun, inter flaviĝintaj malnovaj paperoj, trovis kaj tradukis

LUIS HERNANDEZ

## AMERIKO FLOSAS

Laŭ germana sciencisto, kiam nia planedo solidiĝis, la tero estis kuna en unu sola bloko, kiu, kaŭze de sisma skuegado, fendiĝis kaj diseriĝis. La amerika kontinento disiĝis tiel de la azia-eŭropa-afrika bloko, drive flosante sur iu egega oceano, kiu pro tio dividiĝis je du partoj: Atlantiko kaj Pacifiko. De tiam, Ameriko ade malproksimiĝas de Eŭropo tridek centimetrojn pojare. Estas kurioze scii, ke en la epoko de Kristoforo Kolumbo, la tiel nomata Nova Mondo troviĝis kvardek metrojn pli proksima de Eŭropo.

## RECEPTO POR LA MASTRINO

### Lentoj Stufitaj laú hispana maniero

Purigu difinitan kvanton da lentoj, kaj kuiru ilin en kaserolo kun abunda akvo. Tuj post ĝi ekbolas, oni forigas tiun akvon, por aldoni novan, en kiu ree devas esti longe kaj daŭre kuiritaj la lentoj, per malforta fajro. La kuiraĵo estu spicita per kelkaj laŭraj folioj, duona cepo, du aŭ tri ajloj, unu kariofilo kaj pínĉpreno da salo, kun aldono de iom da kruda oliva oleo.

# LAŬTPAROLILO DE LA ESPERANTISTARO

## LA INTERNA IDEO

En la nuna civilizacio, la naciemo de ĉiu nacia lingvo estas patriota, tradicia, deviga kaj rutina, sed ĝi ne influas sur la laborojn kaj labororezultatojn de la respektivaj nacianoj. La nacieco de la lingvo, la kutima amo al ĝi, la plej-malplej-multa pureco en ĝia uzado, nur pasive kontribuas al ĉiu nacia progreso, ĉar la lingvo mem ludas gravan sed pasivan rolon. Ankaŭ la naciismo arbitre dependas de la kriterio de la tiamaj regantoj. Mankas al la tuto io, kio homame inspiru kaj decidigu; io, kio posedu propran animon kaj tutmondan forton por esti elemento kun fundamento kaj koro, enhavantaj la sanajn principojn, kiujn ĝenerala feliĉo bezonas.

Al ni, esperantistoj, estas facila la kompreno de la antaŭa diraĵo.

Esperanto estas la nura lingvo, kiu uzas internacian ŝlosilon; la nura, kies internaciemo estas paciga, federa, kunfratiga kaj homama; la nura, kiu posedas ĉiajn kvalitojn necesajn al estonta disvolviĝo de pli civilizita civilizo, de pli progresema progreso, kie vivu homoj kompreneme amikaj kaj homaro ĝenerale feliĉa, en harmonie aranĝita socio.

Kiel Esperanto faras etikajn miraklojn?

Ĉio, kio ekzistas, en la intimo de ĉiu homo, plej nobla, plej altruista, plej plena je bondeziroj kaj malavaraj pensoj; ĉio, kio vivas en la homa menso, por akcelo de tutmonda kunfratiĝo; ĉio, kio volas komprenemon kaj interkombinon en ĉiaj cirkonstancoj eĉ la plej gravaj; ĉio, kio celas, sendepende de rasoj kaj klasoj, sensofisman pacon al ĉiuj homoj: vivantoj, kies intelekto devas kongrui kun praktika saĝo; tiuj ĉioj, kirlitaj en miksaĵo homogena, bonintenca, pura, lojala, sincera kaj amika, iĝas tio, kio --inter ni-- estas nomata la interna ideo de Esperanto.

Tiu homo, kiu, eĉ nur konscience, krimas kontraŭ la interna ideo, povas esti lerta kaj sperta esperantisto, sed ne estas vera esperantisto, tute ne estas zamenhofa esperantisto. Per plej firma kaj sentima bisturio ni povos sekci vere esperantistan koron, ni trovos nur, kune kun la ruĝa sango, la plej helpeman humanecon, la plej malavaran dediĉon, la plej sanan ambicion al la feliĉo de la Homo. La *Interna Ideo* tiel enradikiĝis en Esperanton kaj Esperanto tiel estas disiĝita jam, tra la tuta mondo, en ĉiujn bonajn sektorojn de la homa vivo, ke eĉ kiam la tradicio, la kutimo kaj la malsaĝo komplotos kontraŭ la oficiala aprobo de nia Esperanto, tiu ĉi venkos malgraŭ ĉio, ĉar la interna ideo ĝin subtenas.

Povos konservativuloj, tradiciaj partiantoj, ĝin grimaci, povos skeptikuloj, kompatindaj spiritoj, ĝin fornei, povos la registaroj, pro nekonfesindaj motivoj, ĝin forpeli; la celo estas tiel klara kaj taŭga; la afero tiel solide kaj cemente bazita, ke ĉiaj fiklopodoj, eĉ altrangaj, kontraŭ ni, estos vanaj. La interna ideo nin protektas!

**SALDANHA CARREIRA** - Lisboa

## INTERLINGVA PARALELO

### ORIGINALO

Efektive, la famo de l' aŭtoroj povas iri ankoraŭ, nuntempe, nur tien, kie iliaj respektivaj lingvoj estas parolataj. Nur bonaj tradukistoj povas pli ampleksigi tiujn lingvajn limojn, konigante al alilingvanoj la literaturajn trezorojn; sed, tiuj bonaj tradukistoj mankas plej ofte, kaj multaj majstroverkoj restas nekonataj de la alilingvaj popoloj, aŭ ili estas fuŝe tradukataj de nelertaj tradukistoj.

El prologo de la urugvaja profesoro Manuel Fernández Menéndez, por lia traduko de la verko «Ariel».

### TRADUKO

**Efectivamente, la fama de los autores puede ir todavía, en la actualidad, solo allí donde sus respectivas lenguas son habladas. Unicamente buenos traductores pueden ampliar tales límites lingüísticos, dando a conocer los tesoros literarios a gentes de otros idiomas; pero, con la mayor frecuencia, faltan estos buenos traductores y muchas obras maestras quedan ignoradas de pueblos con diferente idioma, o son deficientemente traducidas por torpes traductores.**

De un prólogo del Prof. uruguayo Manuel Fernández Menéndez, para su traducción de la obra «Ariel».

Vi povas esti membro de INTERNACIA GEOGRAFIA ASOCIO (jarkotizo: 24 pesetoj) kaj abonanto de «Geografia Revuo» (abono por kvar numeroj: 48 pesetoj). Turnu vin al la delegito kaj peranto por Hispanio: Adonis González Meana - EL ENTREGO (Asturio)

# CASTELLON, NIA NUNJARA KONGRESURBO

Ĉiu kongresurbo havas sian specialan trajton, sian propran ĉarmon. Madrido, la pasinta, distingiĝis pro sia majesteco kaj elstareco. Castellón, la venonta, allogas pro sia ĝentileco kaj gastameco. En la historio de la hispanaj Esperanto-Kongresoj, neniam la aliĝintoj trovis motivojn por plendo aŭ riproĉo. Ĉi-foje, oni ankaŭ tre bone elektis la urbon por nia landa kunveno, kie la kongresanoj ĝuos, en pura samideana medio, agrablan restadon, marbordajn plezurojn kaj neforgeseblajn ekskursojn, ekster fruktodonaj taskoj kaj literaturaj festoj, kiel brila kompletigaĵo en la karakterizaj kvalitoj de nia temperamento.

La urbo aspektas tre simpatie kaj altire pro la pureco de siaj stratoj kaj placoj, kun bela kaj ampleksa parko, inter la sorĉa beleco de la ĉirkaŭanta panoramo de alta montaro kaj vastega oranĝarbaro, tuj apud strandoj kaj plaĝoj de la blua Mediteraneo. Krom tio, la natura gastameco de la loĝantaro kaj la favora sinteno de la aŭtoritatoj garantias plej kontentigajn ŝancojn por ripozo kaj distro, en facilaj rilatoj kun la tuta kongresanaro. Sed, por eksterlandanoj kaj por «internaj» hispanoj, la ĉefa logo de Castellón estas ĝia hele lazura marbordo, kie la varmajn salutojn de radianta suno mildigas la refreŝigaj karesoj de senĉesa ondado, laŭ mara melodio, ĉe la rando mem de densaj pinarbaroj.

Tie, ĉiutage, estos senlimaj la eblecoj por sun- kaj marbanado. Cetere, dum neforgeseblaj ekskursoj, oni povos viziti pitoreskajn surmontajn kapeletojn, ruinojn de mezepokaj kasteloj --bastionoj kontraŭ tiamaj oftaj atakoj de piratoj-- kiel konvena preparo por la grava ekskurso al la fama ŝtona relikvujo de Peñíscola (elp. Penjiskola) la granita citadelo, kie la papo Benedikto XIII[a] daŭre, kun aragona obstino, defendis siajn papajn titolojn kaj ceterajn privilegiojn kontraŭ ĉiuspecaj atakoj de homoj, tempo kaj fatalo...

En ĉi tiu kadro do, kun modernaj kaj antikvaj rebriloj, disvolviĝos la diversaj aranĝoj de nia 19[a] Kongreso, laŭ zorge studita programo, kiun nun jam preparas entuziasma komitato, sub la aŭspicioj de komprenemaj urbaj aŭtoritatoj. Oni povas aserti, sen plej eta dubo, ke, dum la daŭro de l' Kongreso, Esperanto plene regos kaj pompos en la bela urbo Castellón. Antaŭ tiel kontentigaj aŭguroj, ĉiu hispana esperantisto faros sian eblon por ĉeesti kaj frandi tiun unikan eventon, kies variaj bildoj restos eterne en la memoro kaj koro, kiel plej sorĉa fantazio aŭ kiel spirita ornamo de nia praktika idealismo.

Ni ne volas emfazi pri la devo aliĝi, sed nur atentigi pri la multaj materiaj avantaĝoj, kiujn la kongresaneco ebligos kaj kiujn, tute certe, ĉiuj klopodos profiti. Nu, via nomo estas jam de nun atendata. Eksterlandanoj rajtas aliĝi plej bonvene tute senpage.

## XIX CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO • Castellón 24-27 Julio 1958

**Dirección del Comité Organizador: Calle Alloza, 189 - CASTELLÓN**

**El programa provisional, publicado en nuestro número anterior, está sufriendo ligeras modificaciones que lo hacen más atractivo. La velada inaugural (interkona kunveno) tendrá lugar en la Pérgola del Parque de Ribalta, durante la verbena de San Jaime, en la que todos los participantes encontrarán un ambiente cordial y divertido. La solemne inauguración del Congreso se hará en el salón de actos del Ayuntamiento, con asistencia de las primeras autoridades. Gracias a las acertadas gestiones del Comité Organizador, es posible la participación hasta de los esperantistas más modestos económicamente, por disponerse de un magnífico hospedaje colectivo, con más de 50 camas, como servicio casi gratuíto. Si a esto se añade la acostumbrada rebaja en los ferrocarriles y la gran variedad en los hospedajes normales (según puede verse en la hoja de inscripción que se adjunta en el presente número) la asistencia a este magno certamen del esperantismo español es factible y fácil para todos.**

**Se está procediendo a la impresión de un vistoso sello (glumarko) y de una artística tarjeta; el sello puede ya encargarse al precio de UNA pta. por cada hoja con 8 sellos a 2 colores**

**Pro la bonvolo de niaj subtenantoj, la venonta numero, kiu aperos komence de Majo, estos eksterordinara kun 12 densaj paghoj da bonkvalita enhavo**

# NOVAJ LIBROJ SUB LA EFIKO DE Kritiko

**LA VIVO DE LA PLANTOJ** de Paul Neergard kun desegnaĵoj de Mads Stage. Eldonejo STAFETO, serio Popularscienca. 123 paĝoj. Prezo: 80 pesetoj.

La Eldonejo Stafeto de Prof. Régulo Pérez en La Laguna, Kanariaj Insuloj, kiu donis jam al la esperantistoj tiel gravan aron da verkoj originalaj kaj tradukitaj, regalas nin hodiaŭ per nova juvelo: tiu ĉi verko de D-ro Paul Neergard, pri la Vivo de la Plantoj.

Krom tio, en tiu libro la eldonejo komunikas, ke tiu estas la unua el la nova serio popularscienca, kiun la eldonejo entreprenas, kaj tiu anonco, veninta de eldonejo, kiu per faktoj montris ĉiam siajn aspiron kaj celon, estas motivo de ĝojo por la esperantista mondo, ĉar ni povas tiel montri al skeptika mondo librojn kiuj tiel per sia enhavo, kiel per sia arta aspekto, konvinke vidigas la aktualecon, vivon kaj prosperon de Esperanto.

Grandan sukceson en ĝia entrepreno ni devas deziri al la brava Stafeto!

Paul Neergard, jam konata en Esperantujo, per sia antaŭa verko «Atakoj kontraŭ la ĝardenplantoj», per kiu li montris abunde sian sciencon en tiu ĉi fako, donas al ni, en «La Vivo de la Plantoj», novan elmontron de sia klereco kaj perfektan ateston de la taŭgeco de Esperanto por la Sciencaj taskoj. Oni legas la libron kun la sama intereso kaj avido, kun kiuj oni tralegas viglan romanon; ne mirinde, ĉar la libro temas pri tiu, ŝajne kvieta, sed reale potenca aktiva vivado de la vegetala mondo, sen kies prospero, la homa vivo estus ja absolute neebla; ĉar sole ĝi kapablas transformi kaj alporti al ni tiujn materiajn substancojn, kiujn ni nepre bezonas, por nia ekzistado en la mondo.

Speciale interesaj estas la ĉapitroj pri la konstruaĵoj de la planta regno, kun elmontro de nesuspektitaj fortoj, kiel tiuj pri la florado kaj renovigado de la plantoj, kaj eĉ ruzoj por ilia reprodukto kaj por la diseriĝo de la semoj, kiuj garantias la daŭran disvolviĝon de la plantoj.

Neniu persono rajtas ignori la vivon de tiuj estaĵoj, tiel malsimilaj al la homoj, sed kun kiuj ni devas ĉiam kunvivadi, sen kies helpo, nia propra vivo estus nekomprenebla. Penetri iom pli en la misteron de tiuj estaĵoj, estas ja valora paŝo por kompreni nian propran homan ekziston.

Pri la stilo uzata de Paul Neergard en sia verko, nur laŭdojn oni povas fari; la lingvo fluas, bela, simpla, akurata. Kompreneble, en scienca verko troviĝas teknikaj vortoj, sed en la fino de la libro estas listo de tiuj vortoj, kun la oportuna klarigo. Mankas ankoraŭ diri, ke la libro estas krome ilustrita per artaj desegnaĵoj de la dana artisto Mads Stage, kiuj estas tre ĉarmaj kaj faras la libron duoble interesa tiel por la okuloj, kiel por la menso de la leganto.

Ĉar la spaco disponebla estas malvasta, mi metas finon al mia recenzo; la libro vere meritas multe pli ampleksan komentarion. La esperantistoj komprenu la valoron de verkoj kiel ĉi tiu, kiu honoras nian movadon, kaj per abunda aĉeto kaj studo de la libro helpu la eldonejon en ĝia laŭdomerita tasko.

**M. SOLÁ** (Tarrasa)

---

**LA IDEALA NUTRAĴO,** de Martinus. El la dana originalo tradukis C. Graversen kaj kontrolis la Literatura Komitato de SAT. Formato 13 x 19 cm., 96 paĝoj. Bindita en verda tolkovrilo kun ora simbolo. Eldono de La Spiritscienca Instituto de Martinus, Mariendalsvej, 94-96, Kopenhago F. (Danujo). Prezo 6'50 danaj kronoj.

La problemo pri taŭga nutraĵo viciĝas ankaŭ inter la grandaj demandoj, kiuj staras antaŭ la homaro. Martinus, kiu tiom profunde analizas ĉiujn naturfenomenojn, dediĉas ankaŭ al tiu fako la tutan kapablon de sia spirita scienco. La eminenta kosmologo akordigas la nutradon de la nuna homo kun la altaj moralaj leĝoj, reviziante la ĝeneralan komprenon pri la nemortiga principo. En «La Ideala Nutraĵo», la 5ª libro de tiu serio tradukita al Esperanto, la aŭtoro klarigas, ke ju pli rafinita estas ia organismo, des pli delikatan manĝaĵon ĝi bezonas.

Dum la primitivulo povis sin nutri per putrintaj manĝaĵoj, la nuntempulo postulas freŝajn nutraĵojn, kvankam ne ĉiam la plej konvenajn. La homo, malgraŭ progresinta en multaj kampoj de la scio, konsiderinde regresis koncerne sian nutradon. La iniciatinto de la Spirita Scienco asertas, ke la nutradosencoj de la moderna estulo ne vekas naturajn malsaton kaj soifon, sed estigas avidon

al nenaturaj manĝaĵoj, kiel pruvas la sennombraj malsanoj de nia epoko.

La instinkto, tiom mirinde evoluinta ĉe la bestoj, degeneris ĉe la homa gento, kiu nun devas eltrovi per sia inteligento, kia nutraĵo estas plej bona por sia organismo en ĝia nuna evolustato. Konsumado de viando ne nur signifas kruelecon, sed plirapidigan mortigon de la konsumantoj mem. Martinus ne atakas viandmanĝantojn, sed lasas, ke ĉiu mem decidu pri tiu problemo laŭ sia spirita sinteno. Li instruas, ke nia nuna sinnutrado estas transira ŝtupo al tiu ideala nutraĵo, kiu, pretigita de la naturo mem, harmonias kun la amaj kaj kemiaj leĝoj. La libro estas interesa kaj pripensiga, kiel ĉiuj de la dana pensulo, kiu antaŭdiras, ke niaj posteuloj legos kun miro kaj abomeno pri la nutrokutimo de siaj antaŭloj, samkiel okazas al ni nun rilate la karnomanĝemajn praulojn; ĉar, la evoluo ne ĉesas, kaj iam estonte la homo forlasos ne nur la viandmanĝadon, sed ankaŭ la vegetaran, kiu, kvankam pli saniga kaj malpli mortiga, ankaŭ ne estas la definitiva homnutraĵo. Ni rekomendas la verkon al ĉiuj evoluintaj ŝatantoj de nova pensmaniero al tiuj, kiuj deziras eduki sin en alia mondkoncepto, kaj precipe al tiuj, kiuj vivas ne por manĝi, sed manĝas por vivi.

RICARDO QUILES

---

**VERONA** — Okpaĝa gvidfolio, eldonita de Verona Esperanto Asocio, akirebla ĉe adv. Ettore Sartori. Via Mazzini, 31 — Verona (Italio).

Jen vere taŭga gvidilo por akiri klarajn informojn pri ĝiaj artaj monumentoj:

Palacoj, Muzeoj, Bibliotekoj, Preĝejoj, Stacidomoj kaj aliaj vidindaĵoj, kiuj daŭre tra la jarcentoj donis eternan famon al tiu belega kaj tre romantika itala urbo, kies nomo ankoraŭ nun elvokas la oferemon de Romeo kaj Julieta.

E. H.

---


## LIBRO-SERVO

Libros pedagógicos en existencia

| | | |
|---|---|---|
| GRAMATICA Soler Valls. . | 25 | ptas |
| GRAMATICA Anglada Prior. | 40 | » |
| LERNOLIBRO Mimó Espinalt | 65 | » |
| LLAVE esperanto-español . . | 5 | » |
| DICCIONARIO español-esper. | 75 | » |
| PLENA VORTARO (con suplem.) | 125 | » |

Pedidos a: Pelayo, 7, 1.° - VALENCIA


## S-ano MANUEL CAPLLIURE

**Eksprezidanto de nia Federacio**

*Je aĝo de 84 jaroj, post longa malsano, mortis S-ro Manuel Caplliure, elstara kaj fervora veterano. Lia nomo, kune kun tiuj de aliaj pioniroj, okupas reliefan spacon en la ora tabelo de la unua epoko de la hispana esperantismo. Kiel profesia instruisto, li dediĉis sian sperton precipe en la pedagogio. Li estas aŭtoro de grava Lernolibro kaj Vortaro, kiuj ĝis elĉerpiĝo helpis kaj utilis al multaj lernantoj el pluraj generacioj. En «Instituto de Idiomas» ĉe la Valencia Universitato, li gvidis kurson de Esperanto, kiam nia lingvo, dank' al liaj personaj klopodoj, sukcesis eniri en tiel gravan institucion. Cetere, lia kompetenteco ankaŭ montriĝis kiel redaktoro de «La Suno Hispana», tiu plaĉa revuo, kiu antaŭ kvardek jaroj estis fame konata de la tutmonda esperantistaro.*

*Jam malsana, kun kadukiĝinta korpo, akceptinte la prezidantecon de Hispana Esperanto-Federacio, en la decidaj momentoj de ĝia fondiĝo, li plenumis sian lastan servon, kion neniam forgesos la hispanaj samideanoj, en pia omaĝo nun de alta respekto al lia kara memoro.*

## SAMIDEANA KUNSENTO

La 5an de pasinta Novembro mortis la patro de nia amiko, el la Valencia rondo, Jesús Gascón, kiu, kompreneble, informis pri la malĝoja okazaĵo al siaj eksterlandaj korespondantoj. Unu el ili, sveda S-anino Stina Turner, el Hackefors, tuj post sciiĝo, sendis al S-ro Gascón, pere de speciala agentejo, belan florkronon, kiun, en solena ceremonieto, esperantistaj manoj delikate kaj emocie metis sur la tombon de la forpasinto, kiel ateston de la efektiva solidareco ekzistanta inter la membroj de nia honesta tutmonda familio.

---


YA ESTÁ A LA VENTA EL

**LERNOLIBRO**

**de L. Mimó Espinalt**

**Muy útil para el propio perfeccionamiento**

Precio del ejemplar encuadernado: **65** ptas.

Pedidos a Libro-Servo o al autor L. Mimó

Alcalde Comas, 15 (Creu de Bárbara) **Sabadell**

# PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a Enero de 1958)

| | | |
|---|---|---|
| J. Frugoni - Telde | 25 | Ptas. |
| J. Guzmán - Valencia | 20 | » |
| J. Ibáñez - Valencia | 50 | » |
| Ll. V. - Sabadell | 100 | » |
| A. Jiménez - Tarragona | 25 | » |
| F. Máñez - Zaragoza | 10 | » |
| A. Pastor - Bilbao | 20 | » |
| M. Romero - Monforte Lemas | 10 | » |
| J. Pallás - Valencia | 25 | » |
| F. Alsina - Barcelona | 50 | » |
| J. Montfort - Barcelona | 15 | » |
| S. Alberich - Barcelona | 20 | » |
| V. Perles - Miraflor | 20 | » |
| A. Alonso - Pontevedra | 75 | » |
| J. Bosch - Valencia | 10 | » |
| E. Guillem - Valencia | 10 | » |
| P. Alcedo - Bilbao | 10 | » |
| J. Lerroux - Barcelona | 25 | » |
| F. Santacruz - Barcelona | 20 | » |
| S. Vidal - Barcelona | 25 | » |
| C. Olalla - Bilbao | 25 | » |
| M. Arbona - Palma Mallorca | 25 | » |
| P. Naranjo - Jerez de la Frontera.. | 10 | » |
| J. Vigatá - Cánovez | 25 | » |
| A. Costa - San Mateo | 10 | » |
| J. Rodríguez - Madrid | 25 | » |
| T. Elizondo - Trucios | 25 | » |
| A. Núñez - Pamplona | 20 | » |
| F. Sisón - Zaragoza | 20 | » |
| F. de la Torre - Baena | 50 | » |
| F. Alcina - Valencia | 25 | » |
| S. Gumá - Reus | 15 | » |
| F. Mezquida - Denia | 25 | » |
| J. Ventura - Tarrasa | 50 | » |
| M. Tarragó - Almatret | 25 | » |
| J. Gascón - Valencia | 25 | » |
| J. Casanovas - Gerona | 20 | » |
| P. Reyes - Santa Cruz de Tenerife.. | 20 | » |
| M. Fernández - Uruguay | 80 | » |
| P. Moreno - Madrid | 150 | » |
| V. Rebollo - Barcelona | 50 | » |
| F. Enfedaque - Madrid | 20 | » |
| E. Moreno - Málaga | 10 | » |
| R. Cortijo - Lérida | 25 | » |
| R. Ricou - Santa Eugenia | 10 | » |
| R. Vizcaíno - Valencia | 20 | » |
| J. Valls - Mataró | 50 | » |
| R. García - Sardina del Sur | 10 | » |
| M. Alamo - Valverde-Hierro | 15 | » |
| Hijos F. Soler - Valencia | 25 | » |
| F. Aviñó - Valencia | 20 | » |
| J. Figueras - San Esteban Bas | 25 | » |
| J. Lloveras - Barcelona | 5 | » |
| J. Miró - Barcelona | 50 | » |
| V. Marín - Barcelona | 25 | » |
| A. Salete - Zaragoza | 10 | » |
| V. Ortiz - Tudela | 25 | » |
| M. Cantalapiedra - Valladolid | 10 | » |
| Total | 1.640 | » |

*A la vista de esta lista se refuerza la esperanza... ¡Animo, pues! ¡Adelante!*

**ANKORAÚ NI BEZONAS** en kelkaj provincoj agemajn vendistojn je bona procento. Ebla granda vendado! Skribu, laŭ la januara anonco, al ABABA.

## LA ZAMENHOF-TAGO
### EN LA KANARIA INSULARO

Omaĝe al la glora iniciatinto de la Internacia Lingvo, la Universitata Esperanto-Grupo, en Las Palmas de Gran Canaria, aranĝis interesan programon, kiun oni elsendis per Radio-Atlantiko, kun la partopreno de S-ro Axcelson el Svedio. Kelkaj membroj de la Grupo kantis, aliaj pianludis k. t. p. Sekcio el Hispana Universitata Teatro (TEU) leĝis teatraĵon. La tuta elsendo daŭris kvardek minutojn kaj estis plaĉe aŭskultata. La gazetaro raportis kaj la ĵurnalo «Diario de Las Palmas» publikigis ampleksan artikolon.

**OSCAR YAÑEZ**

## HISPANA ESPERANTO-FERVOJISTA ASOCIO (HEFA)

atingas 70 membrojn; kelkaj el ili partoprenis la fervojistan Kongreson en Stockholm, la sveda ĉefurbo.

La 10-a Kongreso de Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj (IFEF) okazos en Aarhus (Danlando), de la 10-a ĝis la 14-a de venonta Majo. Tien iros almenaŭ ok fervojistoj el Hispanio; kaj la barcelonaj HEFA-anoj intencas proponi la okazigon de la 12-a Kongreso, por la jaro 1960, en Barcelono kondiĉe, ke la hispana Fervoja Direkcio monhelpos tiun aranĝon.- **J. M. G.**

KORESPONDEMULOJ. — Esperantista Koresponda Centro enregistrigas senpage la adresojn kaj korespond-dezirojn de ĉiuj korespondemaj samideanoj. Skribu tuj por partopreni tiun gravan servon al la gvidanto R. Melo, 6, Place Jules Ferry en Saint Etienne (Loire) Francujo. Vi ricevos senpage la regularon kaj ricevateston.

—

Mi dez. koresp. kun esperantist(in)oj el amerikaj landoj; ĉion mi ŝanĝas, escepte poŝtmarkojn. Adreso: Carlos Mestre, str. Serranos, 20-Valencia (Hispanio)

—

Dez. koresp. kun pariza esperantistino, nova samideanino el la Kanaria Insularo. Skribu al Julia Rodríguez Str. José Naveiras, 34 - SANTA CRUZ DE TENERIFE (Islas Canarias) - Hispanio.

—

Deziras korespondadi pola instruisto en eta industria urbo. Skribu al S-ro Edward Piskorski, str. Buczka, 50 PIEKARY SLASKIE. (Pollando)

PERIS - GRAN VIA M. TURIA, 28 - VALENCIA